

SVENSKA
ESPERANTO-
TIDNINGEN

La Espero

2014:2



La klubo en Helsingborg festis siajn 80 jarojn kune kun Ann Burenius kaj Anne Sjölin

Martin Häggström faris turisman vojaĝon kaj viziton al Bona Espero en Brazilo



Uzu Esperanton profesie laŭ la spertoj de Petr Chrdle



Stefan MacGill vizitos la Svedan Esperanto-Kongreson en Lesjöfors.



La 5^a Afrika Esperanto Kongreso en Kotonuo, Benin. Raportas Anita Dagmarsdotter.

LA ESPERO

Organ för Svenska Esperantoförbundet

ISSN 0014-0694

2014 • 102-a jarkolekto

Fondita en 1913

Redaktion: Bengt Olof Åradsson och Olof Pettersson

Frågor om prenumeration, adressändringar o. dyl.:

Box 2276, 103 17 Stockholm, tel. 08-34 08 00.

sveda@esperantoforbundet.se

E-post till redaktionen: laespero@esperanto.se

Ansvarig utgivare: Leif Nordenstorm

Utformning: Omnibus Typografi & Bengt O Åradsson

Tryck: Pingvinpress, Råå

Prenumeration 2014: 200 kr.

Prenumerationsavgiften för La Espero ingår

i medlemsavgiften.

Plusgiro 20 12-3, Esperantoförbundet.

ESPERANTOFÖRBUNDET

Besöksadress: Esperanto-Centro, Vikingagatan 24,

113 42 Stockholm, tel. 08-34 08 00

Postadress: Box 2276, 103 17 Stockholm

E-post: sveda@esperantoforbundet.se

Nätsida: www.esperanto.se

Öppettider: Esperanto-Centro har begränsade

öppettider. Ring i förväg!

Plusgiro: 20 12-3, Esperantoförbundet

IBAN-konto: SE50 9500 0099 6034 0002 0123

Medlemsavgift 2014:

Direktansluten medlem 200 kr.

Ungdomsmedlem (max 20 år) 100 kr. Medlemmar

under 30 år är samtidigt medlemmar i SEJU,

Sveriges Esperantisters Ungdomsförbund.

Hel familj 300 kr (inklusive ett exemplar av La Espero.

Tilläggsexemplar kostar 100 kr/år).

UEA-avgifter och prenumerationer: Leif Holmlund,

Kågevägen 40 B, 931 38 Skellefteå, tel: 0910-733810

ESPERANTOFÖRLAGET

Adress: Box 2276, 103 17 Stockholm

Postgiro: 578-5

Nätsida: www.algonet.se/~eldona

E-post: eldona@telia.com

Telefon: 070-5850054

ESPERANTOGÅRDEN

Adress: Esperanto-Gården, 680 96 Lesjöfors,

Nätsida: <http://www.esperantosverige.se/eg-om-oss>

E-post: egarden@esperanto.se

Telefon: 0590-309 09

Manus till La Espero

sänds till Bengt Olof Åradsson

Nygatan 10A; 281 48 Hässleholm; tel 070-200 4574

e-post: laespero@esperanto.se

	Stoppdatum	Utkommer senast
Nr 1	15 januari	15 februari
Nr 2	28 februari	30 mars
Nr 3	30 april	31 maj
Nr 4	15 augusti	15 september
Nr 5-6	31 oktober	30 november

Utgivningsplanen är preliminär. Den som har brådskande information som måste komma ut senast ett visst datum bör ta kontakt med redaktören i god tid innan.

LA ESTRARO INFORMAS

Styrelsen arbetar intensivt med att förändra arbetsformerna inom SEF. Vi har fortsatt med att, som den tidigare styrelsen, ha våra möten via Skype, vilket betydligt reducerar kostnaderna och gör det möjligt att ha tätare möten. Dessutom försöker vi att i möjligaste mån diskutera igenom frågorna i vårt styrelseforum i EsperantoSverige för att göra mötena kortare. Vi har delat upp vårt arbete i fyra "fokus-områden":

- 1) Stärka medlemmar,
- 2) Info & infokanaler,
- 3) Förvaltning och
- 4) Kongresser.

I fokusområde 1, Stärka medlemmar, ingår bidragsansökningar till projekt och arrangemang runt om i Sverige. Dessutom diskuterar vi hur vi ska bli bättre på informationsutbyte med våra medlemmar. Har du några tips och idéer är du mer än välkommen att dela med dig av dem i SEF:s medlemsforum i Diskutejo. Där finns en rubrik för Förslag till SEF:s styrelse.



Problemet med ekonomin för Esperanto-Centro är tillfälligt löst i och med att vi hyr ut den inre delen av lokalen. Vi får dock inte släppa frågan om vad vi ska göra med lokalen, vår bokförsäljning och vårt arkiv. Andra stora frågor är översyn av rutiner för handläggningen av medlemsregistret samt att omarbeta och förnya kongress-arrangemangen och avgiftssystemet i samband med dessa. Dessa frågor har vi tänkt föreslå att årsmötet ger styrelsen i uppdrag att arbeta med under det kommande året. Tänk gärna igenom hur ni skulle vilja ha det och kom med förslag. SEF:s medlemsforum står öppet för alla som ansluter sig till EsperantoSverige. Det går också att skicka ett mejl till estraro@esperantoforbundet.se



Från en medlem har vi fått ett förslag om att i samband med årsmötet på något sätt uppmärksamma en eller flera medlemmar som på olika sätt engagerat sig för esperanto. Vi har diskuterat hur vi ska gå till väga för att välja ut dem som bör komma i fråga. Ska styrelsen själv bestämma eller ska vi utlysa ett nomineringsförfarande? Ska vi uppmärksamma alla nominerade eller ska vi utse en eller några? På vilket sätt bör de uppmärksammas, genom en gåva eller ett omnämnande? Bara vid årsmötet, i La Espero eller både och?

Det finns många frågor och uppgifter att arbeta med. Vi vill väldigt gärna att fler aktiverar sig och gör sina synpunkter hörda. SEF är ju inte bara styrelsen!

Ann-Louise Åkerlund

Lastmomente, antaŭ la presado de la gazeto, SEF ricevis grandan donacon. Ni sincere dankas al Göran Lundgren, Stokholmo, pro lia donaco de konsiderinda sumo al nia movado. Koran dankon!

Ann-Louise Åkerlund

Kongresa programo

Preliminärt program för svenska kongressen
i Lesjöfors 1 – 4 maj 2014

Torsdag 1/5

- 12.00 – 13.00 Lunch
13.00 – 21.00 Verkstad.
Inledning av Stella,
kort presentation av UEA:s Strategia Plano av
Stefan MacGill.
Därefter övningar, diskussioner, visioner och
möjliga vägar framåt.

(Kaffe och annat tilltugg kommer att finnas
löpande. Buffé med kvällsmat kommer att finnas
så att deltagarna kan ta rast när det passar.)



Stefan MacGill

Fredag 2/5

- 8.00 – 9.00 Frukost
9.00 – 12.00 Verkstad (med kaffe/te under gång)
12.00 – 13.00 Lunch
13.00 – 14.30 Sammanfattning av verkstadsarbetet samt
diskussion
14.30 – 15.00 Kaffe
15.00 – 16.00 Årsmöte Eldona
16.00 – 17.00 5a Afrika Kongreso en Benino – Anita
Dagmarsdotter berättar
17.00 – 18.00 Fri tid
18.00 – 19.00 Kvällsmat
19.00 – 21.00 Invigning, musik samt mingel

Lördag 3/5

- 8.00 – 9.00 Frukost
9.00 – 10.00 Träffa gamla SEF-styrelsen – diskussioner om
året som gick
10.00 – 10.30 Kaffe
10.30 – 12.00 Föreläsning av Stefan MacGill: “La Strategia
Plano de UEA kaj Aktivula Maturigo”
12.00 – 13.00 Lunch
13.00 – 14.00 SEF årsmöte
14.00 – 14.30 Kaffe
14.30 – 15.30 SEF årsmöte (forts)
16.00 – 17.30 ILEI-se årsmöte
17.30 – 18.00 Rondo Langlet
18.00 – Buffé, musik samt samvaro

Söndag 4/5

- 8.00 – 9.00 Frukost
9.00 – 10.00 Andakt och årsmöte KELI
10.00 – 10.30 Kaffe
10.30 – 12.00 Föreläsning av Stefan MacGill: “Kiel labori
internacie”
12.00 – 12.30 Avslutning
12.30 – 13.30 Lunch

Den som vill
ta del av års-
möteshandlingarna in-
nan kongressen, kan be-
ställa dem hos Ann-Louise
Åkerlund efter den 3 april. De
distribueras företrädesvis digi-
talt. Ann-Louise kontaktas på:

annlouiseakerlund@gmail.com
eller 073-617 01 23

La klubo en Helsingborg festis 80 jarojn

La 8an de marto la klubo en Helsingborg invitis al festa renkontiĝo por celebri la 80-jariĝon de la klubo en Helsingborg, ĝuste la saman daton kiam fondiĝis la klubo en la jaro 1934. La klubon fondis 11 membroj kiuj forlasis la tiaman Hälsingborgs Esperantoklubb. Ĉi-foje partoprenis ĉirkaŭ 15 personoj, ne nur el Helsingborg, sed venis ankaŭ gastoj de aliaj skaniaj lokoj kaj de Kopenhago.



Krom bongusta manĝaĵo kaj torto en formo de esperantoflago, la gastoj ankaŭ ĝuis kantojn kaj muzikon de Anna Burenius (el Perdita Generacio) kune kun Anne Sjölin, flutista amikino.

La esperanta agado komencis jam pli frue en Helsingborg. La plej konata pioniro estis G. H. Backman. Jam 1892 li eldonis sian unuan lernolibron. Li ankaŭ fondis klubon en Helsingborg, eĉ pli frue, sed tio okazis antaŭ la estiĝo de SEF. El la prahistorio de la esperanta agado en Helsingborg, indas noti ke Zamenhof kaj aliaj vizitis la urbon 1908.



Anna Burenius gitaro kaj Anne Sjölin fluto (foto Bengt O Åradsson)

La hodiaŭan agadon gvidas Ann-Louise Åkerlund, kiu samtempe estas la prezidanto de SEF.

Gasto

Ny bok av Lars Forsman

För några år sedan recenserade Pia Hellertz min bok om esperanto. Nu har hon läst min senaste bok "Barn-
domsminnen från Apoteket i Bräcke" – tidsdokument från 40- och 50-talet. Hon blev begeistrad och skrev återigen en recension och den finns på min hemsida www.larsforsman.se tillsammans med läsares bedömningar av boken.

I handeln säljs boken för 199:- men mina tidigare bokköpare får den för 100:- + porto.

Köper ni ytterligare en eller flera böcker från min hemsida bjuder jag på portot för hela paketet.

Här är några uttalanden från läsare:

- Nu känns det som jag bott i Bräcke fast jag aldrig varit där.
- Sträckläste natten igenom och skrattade så våldsamt att katten smet ut genom luckan.
- Vilka minnesbilder, vilken humor, vilket språk!
- Äntligen en bok utan våld, elakheter, girighet och fulheter och ändå så medryckande.
- Kastade mig över boken i ren eufori! Nu ska jag läsa om den och njuta av alla detaljer.

Lars Forsman
Enbärsvägen 17
691 47 Karlskoga
0586-548 11
larsespo@yahoo.se

**Esperanto-Institutets
sommarskurs i Göteborg**
21-25 juli 2014

Information och anmälan
lämnas av Institutets rektor
Lars Forsman
larsespo@yahoo.se

**Somera esperantokurso
okazos en EsperantoGården**
Lesjöfors dum 13-20 julio


Informoj kaj aliĝoj:
egarden@esperanto.se
tel. 0590-30909

Printempa kaj inaŭgura festo en Malmö

La Klubo Esperantista de Malmö invitas al inaŭgura kaj printempa festo la 12an de aprilo je 16 h. La programo temas pri la aktivecoj tra la jaroj kun bildmontrado. Por 50 kronoj vi ricevos kafon kaj torton kaj ĉampanan toston.

Se vi volas partopreni, vi tuj aliĝu al Karin Rylander, karin.rylander@arylander.com aŭ P-O Johansson, 040-263194, 070-307970.

Aliĝu plej laste la 5an de aprilo!



La nuntempa klubejo

Dek sep jaroj pasis post la antaŭa afrika kongreso en Arusha, Tanzanio. Dek sep jaroj kun gravaj ekonomiaj krizoj, kun militoj, kun grandaj malfacilaĵoj por multaj afrikaj esperantistoj. Sed ankaŭ kun paco, kun ekonomia evoluo kaj kreskantaj demokratioj. Kaj tempo por la 5-a Afrika Kongreso de Esperanto (5-a AKE).

En niaj gazetoj la raportoj pri militoj kaj malsatoj abundis, ni ekkonis diktatorojn, landojn kaj regionojn forte frapitaj de katastrofoj. Ni faris nian eblan por helpi kaj ni fiksiĝis en priafrika pensmaniero, kiu ne tiel bone taŭgas hodiaŭ. Hodiaŭ oni trovas bone prosperantan mezan klason en multaj landoj, de la 53 afrikaj ŝtatoj 22 estas mezenspezaj landoj – ankaŭ se de malalta nivelo. La afrikaj altenpezantoj ne devas, eble ne volas, iri al Parizo, Novjorko aŭ Londono por butikumi: Afriko havas multajn altkvalitajn mod-designistojn. Afrikaj ekonomistoj investas en la afrikaj borsoj, plej fortaj en Sudafriko, Kenjo, Niĝerio kaj la t. n. 'cefa'-regiono, la iamaj francaj kolonioj en okcidentafriko.

Ni en la nordo ne tiel bone sekvis la evoluon kiel faris Ĉinio. Por la industrio de Ĉinio Afriko estas grava pro la multaj naturrimedoj tie – pli ol duono de la mondaj rimedoj; Ĉinio forte kreskis kiel evoluhelpa partnero kaj en la merkato. Sed ne nur Ĉinio – inter la t. n. BRICS-landoj la intereso pri la afrika merkato estas granda.

Adjevi Adje



Sed vi eble volas koni la esperantomovadon en Afriko. Troviĝas 17 landaj organizoj, el kiuj ok estis reprezentitaj en la kongreso: Benino, Burundo, Ebura Bordo, Kamerunio, Niĝerlando, Senegalo, Sud-Afriko kaj Togolando – kaj krom tiuj Haitio, Svedio kaj Svislando, do entute tri kontinentoj. Ankaŭ de Madagaskaro kaj Germanio estis aliĝoj, sed ne partopreno.

La kongresa programo estis abunda kun prezentoj de la movadoj en la diversaj landoj, pri Afrika komisiono, pri aliaj organizoj ligitaj al UEA, estis ekzamenoj, resolucia laboro en tri etapoj, danco – eĉ en la strato – kaj festo, ekskursoj. La inaŭguro kaj la fermo okazis kun partopreno de la vicurbestro, la kongreso estis observata de lokaj medioj. Tre interesa estis prelego de Mireille Grosjean pri la frua historio de Afriko, kun ties alta nivelo eduke kaj science. Oni vere povas paroli pri afrika malhela mezepoko inter la 16-a ĝis 21-a jarcento. Interese estis ankaŭ aŭdi pri la progreso kaj labormetodo de la burunda movado, kie la esperantistaro rapidege kreskas. Kun komencantoj estas proksime al 3 000 esperantistoj en la lando.

Kion ni povas fari ...

por helpi al la afrika movado?

- Korespondi: kun multaj – funkcias rete.
- Donaci librojn: mankas vere legolibrojn kaj internaciajn lernolibrojn.
- Viziti Afrikon: tio donas multe al ambaŭ partioj. Pluraj afrikaj esperantistoj laboras ene de la turisma kampo aŭ volas fari tion.

... kune fari?

En EsperantoSverige eblas oferti lokon por niaj amikoj, informtabulo pri la afrika movado kaj diskutejoj.

Ni certe gajnos, ĉar por ni esperantistoj ja internaciaj kontaktoj apartenas al la vivceloj.

Dum la UK en Rejkjaviko mi mallonge partoprenis program-

eron pri la agado de UEA en Afriko. Mia intereso reveki la kontaktojn inter Svedio kaj Afriko fortiĝis. Mi dum tempo cerbumis pri eblecojn helpi tanzaniano partopreni la 5-an, sed konstatis, ke momente neniu povas elekti inter ili. TEA dormas de jaroj kaj nur unuopuloj daŭre komunikas. La plej diligenta, Mramba Simba, jam havis subtenon de SEF pri sia projekto. Mi decidis provi por havi monon mem iri kaj poste komuniki kion mi trovis al aliaj en Afriko kaj en Svedio. Post kelka tempo la estraro de SEF decidis apogi per subteno/stipendio kiu kovris la bilet-koston.

Oni povas diri, ke la moderna afrika agado ekis dum la Stokholma kongreso en 1980, kiam UEA elektis Hans Bakker komisiito pri Afrika Agado. Li engaĝis plurajn homojn kiel kunhelpantoj – min kiel respondeculo pri kontaktoj kun Tanzanio kaj poste iom nebule Orientafriko. Dum tiuj jaroj la kontaktoj inter svedoj kaj afrikanoj kreskis. SEF kaj TEA en Tanzanio ĝemeliĝis, kvin svedaj kluboj ĝemeliĝis kun Tanzaniaj kaj la klubo de Norrköping jam longe havis ĝemelon en Angolo.

Dum la lastaj semajnoj estis kontaktoj kun Afrika Komisiono pri la ebleco oferti interretan helpon kadre de la projekto Esperantosverige.se por la komitato kaj aktivuloj en Afriko. Momente troviĝas la suba forumo Afriko en la Diskutejo.

*Anita Dagmarsdotter
(Teksto kaj fotoj)*

Ruphino



Kelkaj faktoj

Lejon-ekonomiarna:
Bocvana,
Burkinafaso,
Etiopio,
Ganao,
Kapverdo,
Lesoto,
Malio,
Maŭricio,
Namibio,
Rvando,
Saŭtomeo,
Sejŝeloj,
Sudafriko,
Tanzanio,
Ugando kaj
Zambio.

BRICs-landoj:

Brasilio,
Rusio,
Hindujo,
Ĉinio kaj
Sudafriko.

Antaŭaj kongresoj:

1a: Noce,
Togolando:
27/12/1990-
2/1/1991

2a: Kotonuo,
Benino
28-31/12/1991

3a: Winneba,
Ganao
23/12/1994-
2/1/1995

4a: Arusha
Moshi,
Tanzanio
26/12/1995-
3/1/1996

Iom pri profesiaj aplikoj de Esperanto

Mia et-entrepreno KAVA-PECH (mallongigo de la ĉeĥa: *Kongresová Agentura PEtra Chrdleho*, Kongresa kaj kleriga entrepreno de Petro Chrdle). Ĝi estis fondita en 1992. Esperantistoj ofte ripročas al mi, kial mi ne donis al ĝi Esperantan nomon. Sed mi, konante la malfortan Esperanto-merkaton, komence tute ne planis profesie agi ene de Esperantujo.

Mi uzas por internaciaj rilatoj plurajn lingvojn, nome tri naciajn (la ĉeĥan, anglan, germanan) kaj Esperanton. De tio jam klaras, ke mi ne nur kolektis spertojn en profesia uzo de Esperanto, sed ankaŭ de aliaj lingvoj, kio donas al mi la eblon de komparo.

Krome, mi ne planis agi kiel eldonejo, eĉ mi povas konfesi, ke eldonisto mi fariĝis kontraŭ mia volo: kiam mi, organizante konferencojn ekzemple por la Karola universitato, ekkomprenis, ke la prelegkolektoj estas valoraj kaj do ili meritis porti ISBN por esti devige envicigataj en ĉefaj bibliotekoj kaj bibliografioj, sed tio ŝajnis neebla. La eldonejoj, kiujn mi alparolis, aŭ priridis min ke mi volas eldoni tian ridinde malgrandan eldonkvanton, ekz. 150 ekzemplerojn, aŭ donis al mi astronomian prezon, kiun ne eblis enkalkuli en la konferencotizon.

Tiam proponis mia edzino kaj kunfondintino de mia agentejo Stanjo (bedaŭrinde mortinta en 2000) ke ni registriĝu en la ISBN-sistemon kiel eldonejo kaj mem eldonadu la prelegkolektojn el niaj seminarioj kaj konferencoj, kion ni ankaŭ efektivigis; kaj tiu trudita agado eĉ fariĝis nia hobbio. Ni do sekve komencis produkti ankaŭ aliajn eldonaĵojn kaj de tio jam estis nur paŝeto al kunigo de nia eldonejo kun alia nia komuna hobbio, Esperanto.

Tiel komencis la eldonejo KAVA-PECH, kiu ekde tiam eldonis pli ol 160 librojn portantajn propran ISBN (inter ili pli ol 60 en Esperanto) kaj krome eĉ pli da libroj ĝi produktis laŭmende

por memeldonistoj kaj aliaj eldonejoj. Cetere, inter la mendantoj, por kiuj mi jam produktis librojn, estas ankaŭ kelkaj svedaj eldonejoj por kiuj mi produktas ne nur la librojn en Esperanto; tamen, en la fono ĉiam estas iu esperantisto. Ekzemple mi produktis la lernolibron de la itala por svedlingvanoj, sed la mendinto estis esperantisto Folke Wedlin. Krome mi ankaŭ eldonis kelkajn librojn

kunlabore kun svedaj instancoj, ekzemple kun la eldonejo ESE Stockholm kaj Universitato de Uppsala,

Mi ankaŭ plurfoje ekspoziciis Esperanto-librojn en foiroj, kio ne portis al mi ekonomian gajnon, eĉ male, sed kio estis efika priesperanta informado, ĉar ofte iu demandis pri Esperanto. Kromen Ĉeĥio mi partoprenis la librofoiron en Lajpcigo, sed la plej prestiĝa foir-atingo estis tamen ekspozicio de nia libro ĉe la plej prestiĝa kaj do ankaŭ plej multekosta librofoiro, tiu en Frankfurto ĉe Mohano. Sed ne estis mi, kiu pagis tion. Temis pri la libro produktita kun du ISBN kunlabore kun la eldonejo *KoPäd München* kaj ĝi elektis tiun nian belan komunan libron (skribitan en la germana, sed parte en



Esperanto kaj produktitan ĉe mi) por sia ekspozicio. Mi ne prislentu, ke en la fono de tiu kunlaboro kun la renoma pedagogia eldonejo el Munkeno estis denove esperantisto, Prof. Helmar Frank, al kiu mi estis pro tio tre danka.

Sed revene al la profesiaj aplikoj de Esperanto. Ĉefaj agadoj de KAVA-PECH ekster Esperantujo estis organizado de klerigaj eventoj (kongresoj, konferencoj, seminarioj, kolokvoj) kaj eldonado de libroj. Sed ĝi ankaŭ agis kiel vojaĝagentejo, mi eĉ estis dum unu periodo membro de la estraro de la Asocio de ĉeĥaj vojaĝ-oficejoj kaj -agentejoj. Por esperantistoj mi ofertis peradon de tranoktoj en Ĉeĥio kaj organizis precipe flugkaravanojn al la foraj universalaj kongresoj, sed



ankaŭ Ekoturismajn renkontiĝojn, Skisemajnojn, Internaciajn paroligajn kursojn kaj simile. Krome, kvankam mi ne celis internacian komercon, miaj turismaj Esperanto-partneroj konvinkis min eniri eĉ en ĉi tiun aktivecon, kiun mi neniam entreprenis ekster Esperantujo kaj havis pri tio neniajn konojn.

Kaj la kolektitajn spertojn de tiuj miaj praktikaj profesiaj aplikoj de Esperanto mi ne volis konservi nur por mi mem. Ĉar komence de ĉiuj aktivecoj mi faris erarojn kaj ĉe internacia komerco mi havis eĉ nur negativajn spertojn, mi volis helpi al miaj posteuloj eviti la saman komencon.

Tial mi jam en 1995 eldonis la verketon "Profesia uzo de Esperanto kaj ĝiaj specifaj trajtoj" kaj en la jaro 2013 jam ĝian trian eldonon. Ĉar intertempe la situacio precipe rilate al teknikaj rimedoj konsiderinde ŝanĝiĝis kaj krome mi kolektis novajn spertojn, la tria eldono estas kompletigita pri kelkaj novaj ĉapitroj kaj tiuj, kiuj restis, estas aktualigitaj. Jen la enhavtabelo, laŭ kiu oni povas bone diveni, kion la libro pritraktas.

1. Enkonduko
2. Kvar rilatoj dum la profesia uzado de Esperanto
 - 2.1. Agado de Esperanto-firmao ene de Esperantujo
 - 2.2. Agado de Esperanto-firmao ekster la Esperanto-movado
 - 2.3. Agado de neesperanta firmao ene de Esperantujo
 - 2.4. Agado de neesperanta firmao ekster la Esperanto-movado
3. Entreprenista moralo
4. Jura flanko de la uzado de Esperanto por profesiaj celoj
 - 4.1. Ĝeneralaj trajtoj
 - 4.2. Ekzemploj de "oficialigo" de Esperanto
5. Ekzemploj de kelkaj profesiaj aplikoj de Esperanto
 - 5.1. Eldona agado
 - 5.1.1. Faka literaturo
 - 5.1.2. Beletro
 - 5.1.3. Laŭmendaj eldonoj

- 5.1.4. Teknologia flanko de la libroeldonado
- 5.1.5. Aŭtoraj rajtoj
- 5.2. Turismo
 - 5.2.1. Akcepta turismo
 - 5.2.2. Kleriga turismo
 - 5.2.3. Ekoturismo
 - 5.2.4. Elvetura turismo
 - 5.2.5. Kelkaj avertigaj spertoj
- 5.3. Komerco
6. Lingva flanko
7. Kiel pligrandigi la Esperantomerkaton
8. Konkludo
- Literaturo

Pri la aŭtoro

Mi jam eniris pension, ne plu havas oficistojn kaj finis ĉiujn miajn aktivecojn krom la eldorado de libroj. Ĝi fariĝis mia hobbio kaj do mi esperas resti al ĝi fidela tiel longe, ĝis kiam tio permesos mia sanstato. Sed la pensiigo tamen portas al mia eldonejo problemon. Antaŭe mi dotaciis ĝin de miaj aliaj aktivecoj, precipe de la vojaĝagentejo. Kaj nun do mi povas eldoni nur tiom da libroj, kiom permesas la mono rericivita per vendado de jam produktitaj libroj aŭ se troviĝas iu, kiu aperigon de konkreta libro subtenos.

Rilate al mia eldonejo mi povas fieri, ke krom kelkaj eldonaĵoj el la komenco (kiam ankaŭ ni produktis kelkajn fuŝaĵojn), miaj libroj estis ĉiam konsiderataj de fakuloj kiel la plej profesiaj. "Arne, la ĉefido" far Leif Nordens storm (cetere, ĝin mi eldonis en 2013 ankaŭ en la ĉeĥa traduko) estis deklarita dum la UK en Florenco infanlibro de la jaro — kaj amuz-plezurigis min, kiam mi legis en iu recenzo en la revuo Esperanto pri iu eldonaĵo de Sezonoj "la libro estis tiel perfekte farita, ke mi supozis, ke ĝin eldonis KAVA-PECH, sed ...". Kaj du el miaj libroj, Aventuroj de brava soldato Ŝvejka far Jaroslav Hašek, ilustrita de Josef Lada, kaj R.U.R. (Rossumaj universaliaj robotoj) far Karel Čapek ilustrita de Miroslava Tomečková, estis envicigitaj en la serion Oriento-Okcidento de UEA. La plej furora el la libroj en Esper-



anto ĝis nun fariĝis Ilustrita frazeologio, komuna verko de lingvistino prof. Sabine Fiedler el universitato en Lajpcigo kaj ĉeĥa humoristo kaj ilustristo Pavel Rak. Ĝia dua eldono viciĝis dum la UK en Bjalistoko inter la 10 plej vendataj libroj. Kaj miasupoze ĝin baldaŭ sekvos la primovada legolibro de Bent Jensenius Bonvenon en nia mondo, kies unua eldono estis relative baldaŭ disvendita kaj ni ĝuste nun preparas la duan aktualigitan eldonon.

Petro Chrdle



Turistvojaĝo al Bona Espero

La bieno-lernejon “Bona Espero” en Brazilo mi vizitis ĉi-vintre. Ĝi situas en altebenaĵo 230 km norde de la ĉefurbo Brasília. La vojaĝo estis organizita de Esperantotur en Bydgoszcz kaj daŭris unu monaton ekde meza decembro. Mi partoprenis malgrandan grupon de ses personoj, kiun gvidis la UEA-estrarino Barbara Pietrzak. Krom Bona Espero ni ankaŭ vizitis la urbegojn Brasília kaj Rio de Janeiro.

Bona Espero estis fondita en 1957 de brazilaj esperantistoj kiel sociala institucio por infanoj, kaj ekde 1974 la paro



Esperantistoj ĉe gastdomo en Bona Espero

Ursula kaj Giuseppe Grattapaglia estis ĉefaj prizorgantoj. Ili evoluis Bonan Esperon al moderna lernejo-internulejo, kie multaj infanoj el malbonaj kondiĉoj inkluzive orfoj ricevis edukadon en familia rondo. Sed tiu unikaĵo en la Esperanto-mondo nun estas en fazo de ŝanĝiĝo. La bezono de tiu tipo da institucio ne estas tiom granda kiel antaŭe pro la evoluo de la brazila socio, kaj ĉi-

vintre loĝis tie nur tri infanoj. Brazilaj esperantistoj nun diskutas restrukturigon de Bona Espero por evolui ĝin al vera Esperanta Kultur-Centro.

Nia vizito en Bona Espero estis ero de tiu evoluo. Antaŭe multaj eksterlandanoj vizitis kiel laborantaj volontuloj, sed ni estis la unua vera turist-grupo. Ni ĝuis tri-semajnan restadon en tre afabla etoso. Multaj brazilanoj, interalie kelkaj antaŭe tie loĝintaj infanoj, vizitis la bienon dum la kristnaska kaj novjara festoj. Ankaŭ la antaŭa pola televida ĵurnalisto Roman Dobrzyński estis en Bona Espero. Li multfoje vizitis kaj konatigis Bonan Esperon per televidprogramoj kaj libro. Por ni li estis sperta gvidisto kaj instruisto.

Situanta en la brazila savano je alteco de ĉirkaŭ 1200 m la klimato estas milda. Dum nia norda vintro tie estas pluvsezono, kio signifas ke la savano iĝas verda kun multaj floroj kaj birdoj. Ne pluvas la tutan tempon kaj la suno ofte kaj forte brilas. En la ĝardeno maturiĝas mangoj kaj bananoj sed troviĝas ankaŭ aliaj fruktoj. Bona fonto donas puran akvon, kaj preskaŭ ĉiu-tage mi naĝis en la akvorezervujo aŭ en proksimaj



Vidaĵo el Bona Espero trans la savano al Morro Baleia (Monto Baleno)

riveroj. Bona Espero havas propran akvofalon je piedira distanco, kaj en la regiono situas nacia parko kun multaj akvofaloj kaj aliaj vidindaĵoj.

En Bona Espero troviĝas riĉa kolekto de la Esperanta literaturo. Kiam pluvis mi legis el tiu kolekto, kaj vespere ni ofte rigardis filmojn kun komentarioj en la lingvo internacia. Speciala memorindaĵo estis kiam brazila paro, kiuj intencas komenci novan vivon en Bona Espero, invitis nin al ilia nupto en tao-inspirita templo najbara.

Mi esperas ke estos sukcesa la transformiĝo al Kultur-Centro, kie esperantistoj el diversaj mondopartoj povos veni. Mi ja tre ĝuis la restadon en Bona Espero, kaj esperas ke ankaŭ aliaj havos tiun eblecon.

La vojaĝo finiĝis per kelktagaj vizitoj en Brasília kaj en Rio de Janeiro gvidataj de spertaj lokaj esperantistoj.

*Martin Häggström
(Teksto kaj fotoj)*

Akvofalo en Rio Mulungú sur la tereno de Bona Espero



Flordekorita Zamenhof ĉe Bona Espero

